

## & Sir Patrick Spens:

< Rekante 32 el 64 batoj por strofo, entute 1664 paŝoj dum 18 minutoj. El skotangla tradukis John S. Dinwoodie (Belarto 2, aŭtuno 1961). Per disdivido de strofoj donis en melodio lokon por nova rekantaĵo Martin Strid (2016).>

### (#Melodio:

<1,6:4>

(#: FaSo /Fa Fa Fa SolLa /SolMi Mi Mi Mi;Do /Re Re Re TilLa /So So o; ReMi /Fa FaFa FalSo La /So lMi Mi i;Do /Re Re Re TilLa /So So o;;

<[Ti:mi]> mi /mimi mido fa falmi /falso lla so o; /milre dolLa So milre /do do o; mi /mi mildo fa faldo /falso la so mi; /milre doLa So milre /do do o <[Ti:Fa]>

)×26

)+

### (& Strofoj:

'1 E2n /Dunfermlin' la2 /re2ĝo sidas ; Kun /vino ĉe la2 /lipo; "Kie /mi trovos e2stron /le2rtan ; Por /mia nova2 /ŝipo?"

(×: **Nun /tondru nia danco2 /fo3rte ; /ki2e2l ondo2j ŝtormaj ; kaj /la ra2konto2n /vo2ĉoj portu ; /la2ŭte en flua2 /ĉeno!**)

'2 Pa/rolas kava/lir' mal/juna, ; /Kiu apude /sidas ; "Pa/triko2 Spens su/peras ĉiujn, ; /Li lerte ŝipojn /gvidas." .....

'3 La rego do leterojn skribis, ; Sigelis ĝin en ordo, ; Ĝin sendis al Patriko Spens, ; Marŝanta sur la bordo. ....

'4 "Al Norvegujo tuj veliru, ; Al Norveguj' transmara, ; La reĝfilinon revenigi ; Al ŝia hejmo kara." .....

'5 Li legis la unuajn vortojn, ; Ridegis li sen fin': ; Sed kiam legis li la tuton, ; Larmoj blindigis lin. ....

'6 "Kiu min al la reĝ' menciis, ; Kaj kies la propono, ; Ke li min sendu sur la maron -- ; En tiu ĉi sezono? .....

'7 "Ekestu hajlo, neĝo, ŝtormo, ; Al Norveguj' transmara ; Ni devos iri revenigi ; Ŝin al la hejmo kara." .....

'8 La velojn lunde ili hisis, ; Maren rapidi penis, ; Malfruvespere en merkredo ; Al Norveguj' alvenis. ....

'9 Apenaŭ du semajnojn ili ; En Norvegujo loĝis, ; Kiam la lordoj de la lando ; La skotojn ekriproĉis. ....

'10 'La reĝan oron forkonsumi ; Vi skotoj nun arogas." ; "Mensogas vi; mensogas ĉiuj; Senhonte vi mensogas! .....

'11 "Arĝenton portis ni por pagi ; La tutan ŝipanaron. ; Kaj ruĝan oron en la ŝipo ; Mi portis trans la maron. ....

'12 'Pretiĝu, ho ŝipanoj karaj; Ni tie ĉi ne restos." ; "Ho ve! ho mia kapitano, ; Mi timas, ke tempestos. ....

'13 "Hieraŭ en krescent' arĝenta ; Kuŝis la lun' malnova: ; Mi timas, estro, ke nin trafos ; Fatalo katastrofa." .....

'14 Apenaŭ kvar-kvin mejlojn ili ; For de la lando krozis -- ; Ekblovis vento, mallumiĝis, ; La mar' ekfuriozis. ....

'15 Rompiĝis mastoj: la ventego ; Forŝiris ĉiujn ankrojn ; Martelis sur la ŝipon ondoj, ; Frakasis ĝiajn flankojn. ....

'16 "Ho! kie trovos mi mariston, ; Kiu la ŝipon gvidos, ; Dum grimpos mi al la mastpinto: ; Eble mi teron vidos." .....

'17 "Jen estas mi, maristo lerta, ; Kaj mi la ŝipon gvidos, ; Dum grimpos vi al la mastpinto: ; Sed teron vi ne vidos." .....

'18 Antaŭ ol li du paŝojn iris ; Ekkapti la ŝnuraron, ; Tabul' rompiĝis kaj enlasis ; La furiozan maron. ....

'19 "Portu al mi matracojn, velojn, ; Kaj parton de l' ŝnuraro, ; Por ŝtopi ĝin, sed enfluadis ; La furioza maro." .....

'20 Matracojn ili portis, velojn, ; Kaj parton de  
l' ŝnuraro ; Por ŝtopi ĝin, sed enfluadis ; La  
furioza maro. ....

'21 La skotaj lordoj malsekigi ; La ŝuojn ne  
deziris, ; Sed antaŭ la ludfin' la ondoj ; Super  
la kapojn iris. ....

'22 Multajn matracojn silkbreditajn ; La mar'  
surbruste tenis; Multaj nobelaj lordofiloj ;  
Neniam hejmen venis. ....

'23 La manojn la virinoj tordis, ; La harojn ili  
ŝiris ; Pro edzoj, filoj kaj amatoj, ; Kiujn la  
mar' fortiris. ....

'24 Ho! longe, longe la virinoj ; Rigardos el la  
pordo; Ili Patrikon Spens ne vidos ; Veliri al la  
bordo. ....

'25 Ho, longe, longe la fraŭlinoj ; Atendos en  
bonordo ; Amatojn karajn pereintajn ; En la  
norvega fjordo. ....

'26 Cent klaftojn sub la marsurfaco ; Ripozas  
la marpredo -- ; Patriko Spens, kun skotaj  
lordoj ; Kuŝantaj ĉe l' piedo. ....)